# *Díaz-Canel pledas por pliigi la evoluon de informatika socio*



Havano, feb 1 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel kaj la ?efministro Manuel Marrero Cruz, prezidis kunsidon kie oni kontrolis la programon de informadiki?o de la kuba socio.

La entrepreno de telekomunikoj de Kubo (ETECSA), raportis ke pli ol 6 milionoj da aktivaj linioj estas subtenataj nuntempe de la portebla telefonado en la insulo kaj 70% el tiuj konektoj okazas pere de sa?telefono kun aliro al la retoj 2G kaj 3G.

Mayra Arevich, prezidantino de ETECSA asertis ke tiuj kapacitoj plu kreskos en 2020. ?i klarigis ke fine de 2019 pli ol 143 mil domoj estis konektitaj al interreto pere de la reto Nauta Hogar, nombro kiu markas kreskon je pli ol 73 mil kompare al 2018; ?i klarigis ke oni planas kreskon de pli ol 20 mil familioj, kiuj disponos je konekto en la domoj.

La? la evoluplano strategia por la nuna jaro oni anta?vidas kreskon je 200 mil porteblaj linioj kaj 634 mil novaj konektoj al interreto per la telefonoj, aldonis Arevich.

?i precizigis ke inter la prioritatoj oni laboros por ampleksigi la kapaciton de la reto 4G kun prioritato en la regionoj pli dense lo?ataj kaj de ekonomia graveco kun la celo plibonigi la servo-kvaliton.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/213411-diaz-canel-pledas-por-pliigi-la-evoluon-de-informatika-socio

# Radio Habana Cuba